

Nova Provo

Organo de NOVO, Asocio por Komuna Ellaborado de Lingvo Internacia
Numero 10 Oktobro 1996

Modernigi kaj konservi

S-ro Robertson en numero 9 konkludas: Ni devas modernigi Esperanto, sekve ni ne povas konservi la Fundamento.

Lau mia opinio tio ne estas ĝusta. Ni povas fari ambau: modernigi kaj konservi.

Zamenhof montras kiel ni devas agi, en la Antaŭparolo de la Fundamento. Vi legu:

Se la aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas *tro neoportuna*, ĝi ne devos forigi aŭ ŝanĝi la diritan formon, sed ĝi povos proponi formon *novan*, kiun ĝi rekomendos uzadi *paralele* kun la formo malnova. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos *arĥaismo*, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo.

Zamenhof aldonas ke arĥaismoj devas resti en la Fundamento, same kiel en la lernolibroj. Tiel ke por nova esperantistoj la malnova literaturo restas komprenebla.

En ĉi tiu letero mi ne aplikis la akuzativo-n kaj la akordo. Ambau ŝanĝoj Zamenhof jam en 1894 proponis. La signo super la u estas preskau tute superflua.

Kvankam la diskutado estus tre utila, la radikala ŝanĝoj neniam estos akceptita far la movado. Nur simpla proponoj havas ŝanco.

Klaas Riemersma (NL) (ric. 1996-06)

Red.: *En sia libro Kontribuoj al la Norma Esperantologio, Helmuto Velger ankaŭ traktas tiujn ĉi problemojn: „Principe ĉiu institucio, kiu plenumas la kondiĉojn „aŭtoritata“ (rilate la lingvon) kaj „centra“, povus ludi tiun rolon. Konforme al la tradicio, la „Akademio de Esperanto“ ludas ĝin. Gravegas, ke la „aŭtoritata centra institucio“ rajtas [laŭ la Antaŭparolo] nur [...] pli-grandigi (neniam ŝanĝi) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj [...] ne facilanime, sed nur en okazoj de efektiva neceseco.“ (p. 5)*

Por la tuta monda loĝantaro

Mi malabonas *Nova Provo*.

De 1985 ĝis 1995 mi laboris super propra planlingvo, kvankam kun longaj interrompoj. [...] En la pasinta jaro mi radikale alikonvinkigis interlingvistike. Ĝis tiam mi kredis je la Eŭropa karaktero de planlingvo. En 1995 mi konvinkigis, ke planlingvo devas esti kiel eble plej facile lernebla por la tuta monda loĝantaro. Sed por optimumigi planlingvon laŭ tiu kriterio planlingvaŭtoro devas krom havi superrigardon pri la lingvoj de la Eŭropa civilizacio ankaŭ koni la plej vastajn lingvojn ekster la Eŭropa civilizacio. Ĉar mi konas nur lingvojn de la Eŭropa civilizacio, mi devus lerni minimume 5 komplete mal-familiarajn lingvojn. Pro miaj progresinta aĝo (64 jaroj) kaj malbona vidpovo mi verŝajne ne sukcesos en tio en la cetera parto de mia vivo. Tial mi decidis abandoni la konstruadon de planlingvo.

Sub tiuj kondiĉoj legado de *Nova Provo* por mi ne havas sencon.

D-ro Willem Verloren van Themaat (NL)
(ric. 1996-02)

Redaktado, enpaĝigado:

Nova Provo
p/a Günkel, Pf. 10 04 47, 41704 Viersen
☎ (kun respondilo) ...49-2162-33788
Germanio

Financoj, dissendado, provekzempleroj:

Nova Provo
p/a McCoy, Bajonetstraat 78, 3014 ZL Rotterdam
Nederlando

Nepetitaĵojn ni kutime ne repoŝtas.

Iom pri la afiksa sistemo

Ni devus ankaŭ noti la limojn de la afiksa sistemo de Esperanto. Ekzistas pluraj konceptoj aŭ rilatoj, afikse esprimataj en unu aŭ alia lingvo, por kiuj en Esperanto oni devas uzi apartajn vortojn. Ekzemploj estas la tiel nomataj modaj verboj: *devi, povi, voli*. Facile oni povas imagi sufiksojn por esprimi tiujn nociojn: ekzemple konservante la lastajn du trionojn de ĉiu el ili, ni povus havi sufiksojn *-ev-*, *-ov-* kaj *-ol-*. Tiel oni dirovus — tio estas, ni povus diri — ke lernolibron oni ne tralegevas, sed tralernevas; ke du homoj farovas pli multe ol unu; kaj ke mi dirolas al vi la veron... aŭ almenaŭ verkolas interesan monografion.

Pli serioze, ŝajnas al mi, ke la sufikso mankanta plej frape en nia lingvo estas sufikso por indiki reciprokecon. Tiun ideon ni povas ĝis nun esprimi en du manieroj, ambaŭ iom plumpaj: per la adverbo *reciproke* kune kun refleksivo, aŭ per la stranga elipsa esprimo *unu la alian* (kun variantoj *unu al la alia* ktp). Foje ankaŭ la esprimo *inter si* estas uzebila (Kalocsay & Waringhien 1958: §291). *Ĉiuj sin reciproke komprenas; komprenante unu la alian*. Sed la zulusa havas sufikson por tiu ideo: 'kompreni' estas *ukuqonda*, kaj *ukuqondana* — 'kompreni sin reciproke, kompreni unu la alian'. La vorto, aŭ pli ĝuste unuvorta frazo, *nithandanélaní* signifas 'ĉial vi amas unu la alian?': [...] *-an-* (reciprokigilo) [...].
el: Wells, John: *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*, 2-a eld., Rotterdam 1989, p. 36-37.

Fazoj de evoluo

Fakte Esperanto ne estas lingvo aglutina, sed komputila. Ĝi havas ne nur la *Bulonjan* Fundamenton, sed eĉ unu *internan* Fundamenton, la kibernetan, kiu estas ankoraŭ pli strikta ol la ekstera, kaj kiu efektive regas la lingvon. Same la 15-a regulo, troviĝanta en la sistemo, estas multe pli konsekvenca ol la 15-a regulo de la Fundamenta Gramatiko. La naturalismo de Esperanto estas aŭtente do **skemismo**. Kaj ĝia evoluo estas nenio alia ol antevoluo. Sed ankaŭ la evoluo de Esperanto ne malhavas historion, konsistantan el kvar periodoj: 1. la Primitiva [t.e. de la Unua Libro], 2. la Parnasa, 3. la Ilustrala, kaj 4. la Prematura. [...] La ilustrala periodo

[kun PIV], kiu estas kolosa verko de Profesoro Waringhien [...]. En Esperanto kumuligas centoj kaj miloj da imitismaj pseŭdoradikoj, kiuj iom post iom komencas elkreadi ian piĝinan Esperanton, ian okcidentan dialekton [...]. Esperanto staras sur la sojlo de sia plej danĝera ekzistoetapo.

La Prematuran periodon karakterizas ia lingva degenerado. La nuna stato estas multrilate iom kriza. Esperanto travivas situacion, kiun oni povus nomi Okcidental-skismo. La mucida, eksmoda, malmoderna, antiesperanta kaj antiracia naturalismo klopodas korodi la absolutajn fundamentojn de la sola absoluta lingvo de la mondo. Unuj el la simptomoj de tiu krizo estas:

- rompoj de la gramatika sistemo (antifundamentaj duoblaj literoj [...]);
- leksika necerteco (manuskripto – manuskripto);
- ignorado de la 2-a parto de la 15-a regulo (insurekcio – insurekti – insurgento);
- elkreado de paralela lingvo kun neesperantaj pseŭdoprefiksoj *kon-*, *kom-*, *ko-*, (kun!), *im-*, *in-* (en!), *eks-* (el!), kaj aliaj;
- regreso de stilistiko (la lingvaĵo de pluraj lastatempaj dokumentoj estas peza kaj rigida: mankas al ĝi la senpera kompreneblo, kiu tiom ravas ĉe Zamenhof, Privat, Stojan, Waringhien, Lapenna, ktp.) [...]

La ĝisnuna fazo: politik-o, politik-i, politik-isto. La nova fazo: polit-o (komunumo), polit-ik-o, polit-ik-i, polit-ik-ist-o, polit-ismo, polit-isto, polit-iz-i, polit-olog-o, polit-olog-i-o. [...]
La malnova fazo: far-i simple nur transiris al la nova fazo: far, far-i. [...]

Koloni-o, koloni-ism-o, koloni-ist-o. La apero de la novismo *kolono* (loĝanto de kolonio) elvokis aŭtem: [...] kolon-o, kolon-i-o, kolon-ism-o, kolon-i-ist-o, kolon-ismo, kolon-ist-o, kolon-iz-i.

el: Piĉ, Karolo: „Evoluo de Esperanto“, en: *Lj kaj Ni*, Antwerpen 1981, p. 288-290. La tuta artikolo (tre leginda kun i.a. *piki, spekti, klami, skripto, agro, horto, silvo, ab* (= malal, de ĉe) ktp.): p. 287-298.

Interreto kaj majuskloj

.Eble en proksima estonteco, unuforma oportun-alfabeto malstagnos ekster tradiciaj mikrokosmoj. .Estas ja pluraj hejmoj en la Domo-Esperanto! .En luksa INTERNET oni skribas per „x“ kaj „smileys“, kaj oni preferas minusklojn al Majusklojn. .Alloke,

FUNDAMENTO devigas komenci frazojn Majuskle. .Do, Majuskloj ne povas esti surgato de supersignaj literoj. .Providence, dank'al abundega trezoro de PIV, ordinaraĵ homoj kaj Akademianoj povas vortigi la pensojn nur preterlasante vortojn embarasajn por skribi. .OFICIALA SISTEMO estas ja necesa al disvastigo je lingvo UNIVERSALA. .GBEGLO Koffi pravas: Unuformeco ja gravas!

Lastaj Cxapeloj

Malgraux streccigxas la gxistosuloj, cxarmaj cxapeloj hodiaux csesas.

Informadike, sen la plumo, cxe placxa poSto, sxangxas skribumo.

Jam cxie gxermas, la alfabeto elektronika.

Fundamenta risk' de Esperanto estas laux la X'.

.malgraU streCIGas la Gisostuloj, Carmaj Capeloj hodiaU Cesas.

.informadike, sen la plumo, Ce plaCa poSto, SanGas skribumo.

.jam Cie Germas, la alfabeto ekologia.

.fundamenta risk' de Esperanto estas LUDOvic'.

Pierre Estève (FR) (ric. 1996-02)
5, rue de Boyrie, 64000 Pau

Red.: Heroldo de Esperanto 1926-27 sur p. 5 sciiĝas, ke dum la Praga UK „Internet-uzantoj alfrontis la problemon de la nuna fiaosa ortografio: fina rezulto estas rekomendo uzi modelon CX nur por interreto (ĝi interalie solvas malfacilaĵojn pri vicdigo“.

Estimataj inoj kaj iĉoj

Plej necesa ŝanĝo estas laŭ mi RIISMO, tio signifas

- virecon emfazi per finaĵo IĈO
- la uzo de RI (aŭ ŜLI) por estaĵoj kies sekso ne gravas / klaras.

Kompreneble ni bezonos novajn vortojn kiam iĉo povas edziĝi al iĉo, kaj ino al ino ...

Ronaldo Nobel' (NL) (ric. 3.1996)
van Gentstraat 10, 6524 BC Nijmegen

Red.: En la Fundamenta Ekzercaro ni povas legi, ke (a) „ĝi“ estas ne nur por bestoj kaj aĝoj (Gramatika Regulo 5), sed ankaŭ por infanoj: „La infano ploras, ĉar ĝi volas manĝi.“ (§16), „Mi montris al la infano, kie kuŝas ĝia pupo.“ (§18), (b) „li“ servas ankaŭ kiel seksneŭtrala pronomo: „... ke ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinojn;“ (§11), „Ĉar ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al li, ...“

(§13), „pardoni al la malamiko lian kulpon“ (§29). Tial alia seksneŭtrala pronomo (ekz. ri, gi, ŝli k.s.) estas kontraŭtradicia kaj superflua. Dum inoj povas klarajn indikilojn (-in- kaj ŝi), tio tute mankas al la malinoj. Necesas proponoj ne por neŭtrala pronomo (ĉar tiu jam estas „li“), sed por sole vira, kiel „ŝi“ estas sole ina. Tiu „mala ŝi“ povas esti „hi“ (laŭ En „he“ analoge al „ŝi“ = En „shi“, Ni „hij“) aŭ „ri“ (laŭ De „er“) aŭ io alia.

ina flanko: -in- -nj- ŝi, ili
vira flanko: -iĉ- -ĉj- hi, ili
neŭtrala flanko: -ul- li, ili.

Adresoj de projektoj kaj planlingvoj

Bazike, p/a Itamar Alves Pinto
Rua Independência, 101, Bairro Municipal,
34000-000 Nova Lima – MG, Brazilo

Germana **Ido**-societo, p/a Alfred Neussner
Thüringer Str. 3, 37284 Waldkappel, Germanio

Union Mundial pro **Interlingua** (U.M.I.),
Juvelfej 25, 5210 Odense NV, Danio
Servicio de libros U.M.I.
Zonnegloren 30, 7361 TL Beekbergen, Nederlando

Linguna, p/a Hans-Dito Goeres
Viersener Str. 123, 41063 M'gladbach, Germanio

Trasermo, p/a Dr. Janus Di Censo
Via Quarenghi 40/28, 20151 Milano, Italio
(**Red.:** kp „Artikoloj karanĝoj pri nia afero“ sur p. 87.)

ECU (**Unitario**), p/a Rolf Riehm
Platanenstr. 20, 64653 Lorsch, Germanio

Vikta Filial Soplanos, p/a Bosz Vilmos
7624 Pécz, Attila u. 19., Hungario

Zānabūr **Volapūka**, p/a Brian R. Bishop
155 Leighton Avenue, Leigh-on-Sea, Essex
SS9 1PX, Britio

Flenef Bevūnetik **Volapūka**, p/a Ralph Midgley
24 Stanwell Rise, Scunthorpe, DN17 1TF, Britio

Ankoraw neologismoj (daŭrigota)

ans. Prepozicia kaj/aw subjunkcia abrevio (sen komo) det anstataŭ. Ekz.: Oni darfas uzi an la litero „x“ ans supersignoj.

ce-. Pref. montranta an la csesa aw cesa aspekto, kiu esprimas an la nekompleta ago, interrompita ago. Ce- montras, ke la ago cxesis, aw oni cesis an la ago.

-en/oj. Suf. montranta an lingvoj en iu teritorio, sxtato, lando ks. Ekz.: Kanadenoj = Anglezo kaj Francezo, Svisienoj.

-eni/o. Pseudosuf. montranta an dawro det (nombro da) jaroj. Ekz.: mil-enio.

-es/a. Suf.: apartena al. Ekz.: patresa, Petresa domo, urbena tereno, regxesa palaco.

-ip/i. (ntr) Suf. montranta, ke farigxas io. La rezulto estas substantivo. Ekz.: truiĉis = farigxis truoj, matenipiĉis, ni amikiĉis.

kucx/i. (ntr) Movi an sia korpo por esti en kusxa pozicio. Ekz.: Mi kucxis an sur la sofo.

malen/i. (tr) Gxenerala termino por farbi, pentri, surmeti, sursxmiri an ia ajn kolora substanco an likva aw an pasta per broso, peniko, sprajilo, rulo por kolorigi aw dekoracii. Ekz.: Maleni an lipo, vango, bildo, vando, muro, plafono, planko.

-oc/a. Suf. signifianta: rilata al. Ekz. sanoca ekzameno, varmegoca energio, iroca laco, domoca imposto.

sxid/i. (ntr) Movi an sia korpo por esti en sida pozicio. Ekz.: Mi sxidis an sur la segxo.

tu. Prepozicio montranta an la materialo, kiu estas uzata por plenumi an io. Ekz.: Li plenigis an la krucxo tu akvo el puto per taso. Li konstruis an la dometo tu ligno kaj tu brikoj por martelo kaj per trulo. Li kovris an areo tu sablo el rivero per sxovellilo.

Richard Stahl (US) (ric. 1996-04)

Pri la alfabetoj de etnolingvoj

(1) La hispana „ch“ [ĉ] konsiderita kiel unu litero inter c kaj d, fariĝis dultera, t.e. ke vortoj je ch- nun troviĝas sub c. La litero ĥ restas aparta.

(2) La 22 Aŭg 1996 aperis la germana vortaro Duden kun la nova germana ortografio. I.a. en pluraj vortoj ne plu estas superflua kombino kun n (ekz. Jogurt, Panter, Katarr, Myrre, Hämorrhöde, Känguru, Seismograf, Saxofon, Geografie, tamen: Asphalt, Katastrophe, Apotheke, Bibliothek), sed restas ä, ö, ü kaj ß. Pluraj vortoj eĉ ricevis la literon ä anstataŭ e (ekz. schnäuzen, Gämse, Stängel, behände). Plifaciliĝis la regulo pri ss/ß: ss post mallonga vokalo, dum ß post longa vokalo kaj diftongo (ekz. Fuß, Füsse, Fluss, Flüsse, Russland, müssen, ich muss, heißen, außen, ein bisschen, dass [= ke], miss- [= mis-]).

Esperanto kaj la komputilo

Ni konstatis ke pro siaj ĉapelitaj literoj, Esperanto kaj la komputilo ne estas bonaj amikoj. Eĉ ordigado de Esperantaj vortlistoj laŭ sia alfabeto ne eblas sen komplikaj provizora tiuceca aliliterumado kaj sekva, egale komplika, restarigo de la originala. Bezo- niĝas delonge racia ortografio, kaj tiun temon mi ŝatus ĉi tie esplori.

Ni jam arigis, aliacele, 100 000 vortojn da Esperanta novelajo, verkitaĵ de 100 diversaj aŭtoroj. El tiuj 100 000 vortoj, ni elektis ĉiujn vortojn kiujn uzis almenaŭ tri aŭtoroj, t.e. la *komunajn* vortojn, kaj la sumo de vortoj tiaj estas 78622. Tia aro de vortoj ofertas bonan specimenon por esplori la frekvencojn de la Esperantaj literoj kaj fonemoj. La literoj de tiuj 78622 vortoj sumiĝis ĝis 313 536. Plej oportune estas prezenti la rezultojn laŭ elcentoj, jene:

a 12,53	r 5,33	p 2,62	ŭ 0,67
i 11,60	t 4,68	v 2,04	ŝ 0,62
e 8,95	k 4,25	f 0,89	c 0,45
n 7,75	m 3,33	b 0,84	z 0,38
o 7,21	j 3,30	ĉ 0,82	h 0,36
l 6,97	u 3,27	g 0,77	ĵ 0,06
s 6,71	d 2,95	ĝ 0,69	ĥ 0,004

Rimarkinde, la ĉapelitaj literoj, kune, sumiĝas ĝis nur 2,68%. Tiom da ĝeno, el malpli ol 3% de nia skribado! Samtempe ni ignoras kaj kvar literojn preskaŭ internacie konatajn kaj la eblon uzi iom etege da kunmetado! Tiel fari estas nunepoke stulte! Pli uzeble kaj efike, ŝajne, estus dividi la literojn q, w, x, y inter la literoj ĉ, ĝ, ŝ, ŭ kaj krei du kunmetaĵojn por f kaj ĥ kiuj sumiĝas, kune, ĝis malpli ol 0,07%. Tamen, sin ofertas pli racia sistemo. Anstataŭ ol listigi la *literojn*, ni listigu la *fonemojn*, jene:

i 12,01	k 4,41	oj 0,86	h 0,37
a 10,52	m 3,45	ĉ 0,85	uj 0,22
e 9,16	u 3,17	g 0,79	ej 0,11
n 8,02	d 3,05	ĝ 0,71	ĵ 0,06
l 7,22	p 2,72	aŭ 0,70	iŭ 0,006
s 6,95	v 2,11	ŝ 0,64	ĥ 0,004
o 6,61	aj 1,77	c 0,47	ĉj 0,004
r 5,53	f 0,93	j 0,47	ŭ 0,003

La konsona fonemo ŭ (0,003) okazis nur en la ĉina monero *jŭan-*; alie, ekz. en *antaŭ* kaj *antaŭe*, mi taksis la literon ŭ esti diftongera, do ne fonema. Simile, la litero j (0,47) indikas la konsonan fonemon kiel ekz. en *jaro*, la j estante alifunkcie diftongera. La fonemo aŭ konsona paro (kiu?) ĉj (0,004) okazis nur en la vorto *paĉjo*. La fonemo eŭ ne okazis. Ni klasifiku la fonemojn (ignorante no la dubsona ĉj) laŭ frekvencoj, jene:

Konsonaj unuopaj:	n i s r t k m d p v f b g ŝ j z ĥ ĵ ŭ
Afrikatoj:	ĉ ĝ ĥ c
Vokaloj unuopaj:	i a e o u
Diftongoj:	aj oj aŭ uj ej iŭ eŭ

La afrikatoj estas ekzempleroj de konsonaj analogoj de la vokalaj diftongoj, jen:

$\hat{c} = t\hat{s}$, $\hat{g} = d\hat{j}$, $c = ts$

La alian afrikaton dz , ekz. en *edzo*, la kunvoĉan analogon de la senvoĉa c , oni jam literumas racie!

Esperanto estimas la principon, ke ĉiu litero indiku unu sonon, kaj ĉiu sono bezonu unu literon. Kio, do, estas 'sono'? Ĉu diftongo? Ĉu afrikato? Ĉu ni literumu la diftongojn suprajn, unusimbole, kiel ekz. $\hat{a} \hat{o} \hat{a} \hat{u} \hat{e} \hat{i} \hat{e}$?

Tute ne! Ni ne multigu simbolojn! Sed, sed ...? Estas iom da manko de sinkonformeco, ĉu ne? Aŭ diftongo estas unu sono, aŭ afrikato estas du sonoj! Ni decidu laŭ la dua elekto por tiel ŝparu niajn simbolojn: t.e. la afrikatoj $\hat{c} \hat{g} \hat{c}$ (kiuj sumiĝas, kune, ĝis nur 2%) estas ĉiuj du sonoj. Restos pro tia decido sufiĉaj simboloj por ebligi alfabeton kiu bezonas nek ĉapelojn nek kunmetaĵojn. Ĝi estus ankaŭ pli racia kaj pli internacia.

Kian alfabeton? La plej multo de nia alfabeto (a b d e f g h i k l m n o p r s t u v z) restu senŝanĝa. Jen la ŝanĝendoj, komence konsonoj unuopaj, sekve afrikatoj:

$\hat{u} > w$, $j > y$, $\hat{j} > i$, $\hat{s} > x$, $\hat{h} > c$: $\hat{c} > tx$, $\hat{g} > dj$, $c > ts$

Ni argumentu la ŝanĝojn:

Ŭ > W: La litero \hat{u} estas mallonga, nesilaba speco de u (kp la vortojn *laŭeble* kaj *vualo*). La Esperanta litero estas kvazaw oni skribus iun literon u super la alia. Kial do, anstatawe, ja law la cetero de nia skribado, ne skribu la duan flanke de la unua! Kaj tiel rezultiĝas, per iom da evoluo, la formo w . Uzas no w jam nacie por tiu sono kaj la ĉina kaj la angla, kio sumiĝas ĝis eble triono de la mondo! Kial do ne ankaw Esperanto?

J > Y: J > I: La ŝanĝoj interrilatas. La sugestoj devenas ne de mi, sed de Zamenhof mem kaj mi povas nur doni la mian voĉon, post tiom da forpaso de yaroy, por subteni lia bonegan, sed bedawrinde forjetitan, sugeston.

Ŝ > X: Ĉu la sugesto xaynas iom xoka? Law anglo, franco, germano.... yes ya, certe! Sed ĉu ni iom ayn pli xatas la literon Ŝ mem? Tamen, mi ne prenis la ideon de mia ĉapelo. Uzas ĝin tiel nacie yam la ĉinoy, kiuy sin nombras po 1000 milionoy da homoy, kay la 135 milionoy da parolantoy de portugala. Kutimiĝado tre baldaw forxovos iom ayn da alleco.

Ĥ > C: Por \hat{h} restas aw c aw q (ni ne plu bezonas alie la literon c). Espereble (vidu supre) vi ecos mian sugeston ke c estu nia elekto por tiu sono.

Ĉ > TX: Ĝ > DJ: C > TS: Krom la litero c , kiun jus kaptis la sono \hat{h} , ni neniel plu bezonas tiuyn txi literoy. Txiuy estas afrikatoj, fatsile kunmetebly de siay du konsonoy same kiel la diftongoy el siay du vokaloy (taksante kiel vokaloy la du literoy y kaj w kiam ili tiel rolas).

Yen supre la xandjendoy entute! Txu tiel, pro la literado de la afrikatoj, ni xayne sugestis alfabeton malpli efikan? Ni kalkulu yene:

Por pliigo $c > ts$ + 0,45%.

Neniom da xandjo $j > y$, $\hat{g} > dj$, $\hat{c} > tx$.

Malpliigo $\hat{u} > w$ - 0,67%, $\hat{s} > x$ - 0,62%, $\hat{j} > i$ - 0,06%, $\hat{h} > c$ - 0,004%.

Sume, la xandjendoy *malpliigis* nian laboron txe la plumo kaj nian fingrofrapadon txe la klavaro de skribmaxino aw komputilo po proksimume 0,9%; la alfabeto estas pli efika! [**Red.:** Ne por mi, ĉar miakomputile la ĉapelitaj literoj havas propran klavon ($\hat{c}\hat{c}$ sur la klavo $\hat{o}\hat{o}$, $\hat{g}\hat{g}$ sur $\hat{a}\hat{a}$, $\hat{u}\hat{u}$ sur $\hat{u}\hat{u}$, $\hat{j}\hat{j}$ sur \hat{s} k.t.p.), t.e. ke ekz. por \hat{c} mi nun klavas unufoje, dum port tx mi devas dufoje.]

Kiel do ni faris? Ni atingis ya alfabeton sen literoy txapelitay, sen kunmetaĵoy, kay vere law la printsipo de *Unu litero, unu sono* kion (pro la afrikatoj) neniam vere atingis la alfabeto delonge ortodoksa! Ni atingis alfabeton kaj pli fatsile uzeblan (skribmaxine, komputile, modeme) kaj pli internatsian.

Ho, sed caoson! Kion pri la miloy da tekstoy yam presitay? Kiel pri la aliordigendo de la vortlibroy kaj indeksoy? Kiom da konfuzo intertempe pro la du sistemoy kunkurantay? Kion pri la senxandjemuloy? Ni veastro. Ni ne *perdos* nian trezoron yam presitan; dji restos legebla! La aliordigado de la vortlibroy kaj indeksoy estu unufoya laboro por la komputiloy, kay konfuzo xayne eblas inter la du sistemoy nur txe la du literoy j kaj c , kay tiel, pro kunteksto, nur xayne. Kay la senxandjemuloy? Ho yes, yen vere la problemo! Same estas tra la mondo etx pri agnosko de nia lingvo! Sed yen solvo: ni nek devigu nek kontraudevigu la xandjojn; ni permesu kay la skribanto elektu. Tamen tiun elekton yam devigis la modema rondo yam tramonda! Malfelitxe txe la 'Internet' la solvoprovo estas diversay; ofitsiala rekomendo senigus la nuntempan caoson de multajo da sistemoy.

Txu dji aspektas lom strange? Yes ya, ni ne sintrompu pri tio, sed se la Bharatoy, araboy, rusoy, yapanoy, koreoy, vyetnamoy.... volonte lernos la tutan nian alfabeton, ni almenav povas kutimidji kun du-tri tiay xandjoy! Mi esperas do ke vi, legantoy samideanay, ecos la miayn sentoy kay ni txiuy kapablos entrepreni tiun txi bagatelan cirurgion por nia lingvo, grade (la du sistemoj apenav bezonos interbatali!), sencaose, sed nepre antaw ol la Mondo prenos al si nian lingvon kay pli ol kvar, kvin, etx ses miloy da milionoy da homoy krios „Ne tuxu tiel nian lingvon!”

lom aliateme: mirinde, etx preskaw nekredeble, ni atingis txion tselatan kay restas ancoraw neuzita la litero *q*. Mi sugestu, timeme, sed neniel heziteme, ke Esperanto enkorpiĝu la literon *q* por signifu la tramonde frekventsan [= oftan; la red.] sonon *q* de la internatsia fonetika sistemo.

Tony Kelly (Kimrio) (ric. 1996-04)

Red.: *Tiun ĉi proponon de s-ano Kelly komparu kun la Franka-Pinta ŝuŝokubo sur p. 80, kiu nun nomiĝu la Franka-Pinta-Kelia. Kaj komparu kun la rezultoj de la artikolo „Ĉu problemas?” de C. Rivière (el: „ESPERANTO”, n-ro 3, presita en Yes! Sidiju kaj taŭpu!, n-ro 4, 1995-10, p. 5).*

L'esperanto «26»

La 31 Okt 1995 aperis la speciala numero 1995 de *l'esperanto*, la revuo de Itala Esperanto-Federacio IEF. Ĝi estas n-ro 8 de la 26-a jarkolekto kaj titoliĝas „La linguistica, le lingue artificiali e l'Esperanto: un incontro fruttuoso” (= La lingvistiko, la lingvoj artefaritaj kaj Esperanto: konkurso fruktodona) kun tekstoj de Bruno Migliorini, André Martinet, Umberto Eco, Maria Luisa Altieri Biagi, Luciano Canepari, Tullio De Mauro kaj Claude Piron, kun enkonduko de Daniele Vitali. La tuta numero estas en la itala.

Tre interesa artikolo tuŝas nian aferon: „Non c'è proprio niente da dire sulla pronuncia e la grafia dell'esperanto?” (= Ĉu ne estas vere nenio direnda pri la prononco kaj la skribo de Esperanto?) fare de Prof. Luciano Canepari, profesoro pri fonetiko en la Universitato de Venecio (p.29-36).

En la subĉapitro 2.1 li diskutas la ĉapelitajn literojn kaj la problemojn rilate al preso, komputiloj kaj tajpiloj. Li nomas ilin „una specie di bandiera sventolata con orgoglio”, t.e. speco de flago svingata kun orgojo.

Montrinte, ke ne povas esti *h* por anstataŭigi la ĉapelon (ch, gh, jh, sh, hh), li argumentas pere de „rimarkinda komponento palatala”, laŭ kiu „la litero, kiu devos servi anstataŭi l' diakrito, povas esti nur *y*: agyo [aĝo], ajyo [ajo], kacyo [kaĉo], kasyo [kaŝo].”

En subĉapitro 2.2 li daŭrigas asertante, ke „certe la pli moderna kaj pli utila solvo” estas Esperanto «26», t.e. Esperanto sen la „du sonoj plej maloftaj kaj malplej utilaj: [x, ʒ] ĥ, ĵ” kaj nur 26 literoj. Li proponas anstataŭigi la unuan per [k] aŭ [h] kaj la duan per [dʒ] aŭ [j] apogante sin sur la jamaj alternativoj *kaoso*, *kemio*, *jakto* kaj *fazo* = *ĝazo* kaj konsiderante, ke pluraj vortoj kun ĥ jam havas sen-ĥ-an formon, ekz. *koruso*, *kolerao*. La alfabeto de Esperanto «26»:

a b c d e f g h i j k l m n o p
q [ĉ] r s t u v w [ŭ] x [ŝ] y [ĝ] z.

Ekzemploj el la artikolo: yazo (jazo/ĝazo), yuro (juro), yako (jako), yeto (jeto), yeteo (ĝeto), payo (paĝo), ayo (ajo), ajyo aŭ ejyo (aĝo), qevalo (ĉevalo), nawa (naŭa), fixo (fiŝo).

La literon *c* kun ĝia nuna elparolo li defendas. Kiel ekzemplolingvoj estas indikitaj por *q* kiel [ĉ] la ĉina kaj albana, dum por *x* kiel [ŝ] la portugala, kataluna, antikva hispana, eŭska, ĉina, malta kaj sicilia.

La propono de AEIOU

Ekde 1994-03 aperas la kutime 12-paĝa bulteno „Yes! Sidiju kaj taŭpu!” de AEIOU, kies ĉefa kapo estas *Yannic Gicquel* post la morto de *Jon Walter Yung*. En la mezo de ĉiu numero troviĝas la daŭrigata historio de *La fratol de Mowgli* el *La libro de la Jangalo* kune kun konciza priskribo de la nova alfabeto; do ankaŭ en n-ro 5 de 1996-02:

j = y (yes, lojala); j = i (kaj); ŭ = u (auto); w (en westo); ĝ = j; ĉ = ch; ŝ = sh; ŝ = zh; ĥ = kh; ks = x; kz = xz; kv = qu. Jen la reformo! La lingvo cetere restas identa en sia prononco!

Tamen estas plia litero, nome *ĭ*, uzata en la ĉefartikolo de n-ro 5: „*Bedaurinde por la progreso de Esperanto neniu el tiuj pioniroj havis tempon por kreĭ reform-movadon. Sed felice ili alte tenis la valoron de nia lingvo kaj deziris nur la skribo-modifon!*”

Nova Provo invitas diskuti pri *u/ŭ* kaj *i/j*. Kiel laŭ AEIOU prononciĝas *Hokaido*, *kataĭfo*, *kafeino*, *Likhtenshteino*, *Paulo*, *Saul*, *Saudi-Arabio*, *Nauro*, *Raulo*, *Taurido*? Laŭ

PIV kaj PIVS: [a], ai, ei, ej, aŭ, au, au, au, au, aŭ]. Kio pri *balai* (ĉu balaj aŭ balai)? Kial *heimo*, sed *officeyo*?

Novo estas meciita en n-ro 3 de *Yes! Sidi-ju kai taipu!* de 1995-03 sur p.3 kun la tri indikoj, ke AEIOU „*prizorgas NUR la skribon kai respektas aliflanke la lingvon, kia jin donis al ni la evoluo kai tradicio*” kaj „*NUR disvastigas la proponon de Jon Walter YUNG, la 'Universalan Ortografion'*”, kiu „*estas la frukto de la laboro de la iama Unio por Nova Alfabeto kai precipe de jia fondinto Jon Walter YUNG (1937-1991)*”. Yannic Gicquel atentigas, ke „*la grupo AEIOU havas tute alian konduton ol Novo*”. Kp liajn kontribuon en *Nova Provo* sur p.16 kaj leteron sur p.74 kaj la Jungan-Roberconan ŝuŝokubon sur p.80.

AEIOU,

B.P. 2032, 31017 Toulouse CEDEX, Francio

Artikoloj kaj aranĝoj pri nia afero

• La utilega litero ĥ. Pledo por esperanta fonemo; artikolo de: Daniele Vitali; en: *Literatura Foiro*, n-ro 161, 1996-06, p. 131-133.

• Reformo aŭ puŝevoluo? Post la Piĉa, jen la Janusa!; recenzo de: Marco Picasso; en: *Literatura Foiro*, n-ro 161, 1996-06, p. 134-137.

• 1995-11-25 Dr. Janus Di Censo prelegis pri sia projekto Traserno dum la jarkunveno de GIL (= Gesellschaft für Interlinguistik, p/a Dr. sc. D. Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, 12683 Berlin, Germanio).

• 1996-07-31 C. J. Günkler prelegis pri Esperantidoj kaj la laboro de *Novo* dum la 52-a IJK en Güntersberge/Harz.

• 1996-11-16 C. J. Günkler: prelego pri Esperantidoj kaj la laboro de *Novo* dum la jarkunveno de GIL en Berlino.

Red.: *Novo kaj Nova Provo komprenas sin kiel centralon de proponoj, provoj, projektoj kaj protestoj rilate al Esperanto, la ellaborado de Esperantidoj aŭ aliaj lingvoj internaciaj. Bonvolu informi nin pri materialo aperinta aliloke pri ni aŭ pri nia afero. Koran dankon!*

Forigo de la supersignoj

Koncerne la forigo de la supersignoj mi ŝatas atentigi pri la itala „gi” por signi la sono ĝ. Ekz.: adagio.

Mia proponoj estas: ĉ → ch (ekz. chambro), ŝ → sh (shafo), ĝ → gi (pagio), ĵ → j; ĵ malaperas kiel signo kaj kiel sono. Antaue ni ŝanĝas la elparolo de kiel eble plej multe da vortoj. Ekz. ĉielo → cielo, ŝtono → stono. Post peto mi sendos la plena listoj al anoj.

Klaas Riemersma (NL) (ric. 1996-06)
Vrolijkstraat 202-A 1hg, 1092 TT Amsterdam

Supersignoj prave

Mi tute konsentas kun Lécaille (NP 8), necesas enkonduki ne-eŭropajn vortojn! Pri deklari intencojn: esperanto ne estas perfekta. Jes indas klare distingi la du emojn: la emon plibonigi esperanton (egzemple Rismo) kaj la emon krei novan mondlingvon. Pri alfabeto: laŭ „Guinness” la „kamboĝa” uzas 74 literojn, laŭ mi prave, kvankam verŝajne ne ĉies oreloj kapablas distingi ĉiujn ... Ni fanfaronas ke eblas per esperanto protekti malpli grandajn lingvojn. Kontraste al tio, laŭ mi: elekto por 26-litera alfabeto estas malstimulo al uzo de lingvoj kiuj uzas pli da literoj ... Mi volas plibonigi esperanton, ĉu kun aŭ sen aproboj far la akademio. Eventuale mi ankaŭ kunlaboros ĉe ekesto de nova lingvo.

Ronaldo Nobel' (NL) (ric. 1996-08)

Bazike

La planlingvo Baziko de s-ano Alves Pinto bone evoluas. Jen tre konciza superrigardo kaj teksto el la versio 96/C. Estus bone, se tiel multaj kiel eble novistoj kontaktu lin.

• La alfabeto estas kiel la Esperanta, krom C [ĉ], J [ĵ], Q [ĝ], W [ŭ], X [ŝ], Y [ĵ].

• Substantivoj finiĝas je *-e*, plurale je *-es*. Adjektivoj je *-a*, plurale je *-as*. Adverboj je *-ey*, por montri direkton: je *-oy*. Ekzistas genitivo je *-o*, plurale je *-os*. La verba *-i* restas *-i*. *-as*, *-is* kaj *-os* fariĝas *-an*, *-en* kaj *-on*, pasive: *-ar*, *-er*, *-or*. Ekzistas subjunktivo: aktive je *-ax*, *-ex*, *-ox* kaj pasive je *-al*, *-el*, *-ol*. Nur kvar participoj, nome aktivaj indikativa kaj subjunktiva kaj pasivaj indikativa kaj subjunktiva: *-un*, *-ux*, *-ir* kaj *-il*.

• Kelkaj vortoj: *ar* (-n), *bet* (eĉ), *iw* (kaj), *luz* (do), *nat* (eĉ ne), *non* (ne), *om* (ol), *ow* (aŭ), *poys* (ĉar), *pru* (mem), *qaw* (ĝis), *saz* (se), *tu* (ĉu), *wew* (ja), *wi* (jes).

• Baziko havas tri ĉefverbojn: *xri* (= esti kiel ligoverbo), *hi* (= esti ĉe partecipoj) kaj *sti* (= esti kiel statoverbo).

• La personaj pronomoj estas *mi, vi, li, xi, zi; nis, vis, lis, xis, zis; onis; si*.

La objekte du Baziko, tamen, non xran twom mondskala kwey twa du Esperanto. Almeney, non nun. La awtore sercen defini Bazika nur kwey filozofia rimede, kwey adekwata platforme por sia propra plua cienza ellernade. Sed li esperan ke Bazika montron efektiva utileze al alias „pensistes”, kwi luz quox simila plezure kwey li apan per la uzade du yu planlingwe zorgey definira. Iw, xay, kun la kunlabore du kelkas simpatiu-les al Bazika, jia verke povox dawri iw evolui al yu nova rimede por fasilifi la labore du twi, kwi interesiqon apliki ze al sia razia pensosisteme.

La objektivo de Baziko, tamen, ne estas tiom mondskala kiel tiu de Esperanto. Almenaŭ, ne nun. La aŭtoro serĉis difini Bazikan nur kiel filozofian rimedon, kiel adekvatan platformon por sia propra plua scienca ellernado. Sed li esperas ke Baziko montrus efektivan utilecon al aliaj „pensistoj”, kiuj do ĝuus similan plezuron kiel li havas per la uzado de unu planlingvo zorge difinita. Kaj, eble, kun la kunlaboro de kelkaj simpatiuuloj al Baziko, ĉi tiu verko povus daŭri kaj evolui al iu nova rimedo por faciligi la laboron de tiuj, kiuj interesiĝos apliki ĝin al sia racia pensosistemo.

Alvespinto (BR) (ric. 1996-05 kaj -08)

<italves@brufmg.bitnet> aŭ /ow

<italves@oraculo.lcc.ufmg.br>

Lingvomallongigoj uzataj en *Nova Provo* : i.a.

En angla	De germana	Ni nederlanda
Ar araba	Es kastilia	El nov-greka
Bg bulgara	Hu hungara	Pl pola
Cs ĉeĥa	Id indonezia	Pt portugala
Zh ĉina	It itala	Ro rumana
Eo Esperanto	Ja japana	Ru rusa
Fr franca	Yi jida	Tr turka

(laŭ: *Plena Pekoteko 85-90, Vol. II, Bailiboro 1992*)

Pri ni

(1) S-ano Riemersma skribis al ni: „La sukceso de *Nova Provo* estus pli granda, se la presmaniero estus pli agrabla. La partoprenan-

toj sendube volus pagi pli. La enhavo de *Nova Provo* ŝajnas kelkfoje iom ĥaosa. Eble estus utile se la anoj koncentras si al unu temo dum kelka tempo. La kontribuoj kelkfoje estas malfacile legebla. Pro tio ke ili estas skribita ne en la oficiala ortografio.“ Kaj s-ano Nobel': „Ne jam egzistas ĝenerala periodaĵo kiu legas ĉiuj (ge)esperantistoj. Tial ekestas malklareco pri la signifoj de vortoj, kaj nescio pri egzemplaj translokiĝoj.“ Tial tiuj ĉi demandoj al vi:

(a) Kiel oni ŝanĝu viaopinie la aspekton kaj la presmanieron de *Nova Provo* ?

(b) Tiu ĉi n-ro 10 traktas diversajn temojn. Ĉu estonte nur unu temo po numero aŭ eĉ nur daŭre unu temo ĝis kiam ĝi estas finita?

(c) Ĉu la kontribuoj restu en la propra ortografio aŭ ĉio en la Fundamenta aboco?

(2) Esperanto «26» senkaŝe parolas pri ŝanĝi radikojn kaj s-ano Riemersma ellaboris tutan tian liston. Tio pruvas, ke la vortelekto Esperanta dependas de la uzata alfabeto. Oni atentu, ke «26»-alfabeto oni eble ŝanĝos „jurnalisto“ [ĝ-] al „jurnalisto“ [j-], „yardeno“ [ĝ-] al „gardeno“, „xtono“ [ŝt-] al „stono“ k.s. por gardi (aŭ reakiri) la rekoneblecon. *Nova Provo* do invitas vin diskuti, ĉu la Esperanta vortaro ŝanĝiĝos laŭ la definitive elektita nova alfabeto. Se ni ricevas sufiĉe da tiurilataj kontribuoj, tio estos la ĉeftemo de NP 11.

Listo de l' kontribuintoj de NP 1 ĝis 10 kun indiko de la paĝoj, kie ili aperis

Ahlberg 1	Lécaille 69
Al-Amily 56	Martínez 46
Alves Pinto 22, 34, 73, 88	McCoy 1, 9, 17, 25, 37, 45, 52, 55, 57, 72
Bosz / Bóš 74	Monja 18, 52
Brilleaud 55	Navareño 18, 48, 61, 68
Dao 3, 9, 53	Neussner 74
Dalton 64	Nobel' 74, 83, 87
Edgcombe 4	Riemersma 29, 66, 81, 87
Estève 61, 74, 83	Robertson 21, 28, 49, 77
Galindo 14, 28	Ruiz Karell 35, 60
Gicquel 16, 74	Schumann 59
Goeres 20, 66, 78	Stahl 15, 20, 35, 54, 63, 70, 75, 84
Günkel 62, 65, 71, 80	V. van Themaat 23, 35, 82
Halvelik 5, 11, 32, 46, 71	Werdin 35
Kamen 10	Wood 27, 70
Kelly 53, 58, 76	
Kobelt 26, 67	